# *En Sudafriko, prezidanto de la Parlamento de Kubo, Esteban Lazo*



**Foto: PL**

Havano, feb 26 (RHK) La prezidanto de la Nacia Asembleo de Popola Povo de Kubo (Parlamento), Esteban Lazo Hernández, alvenis hodia? en la sudafrika ?efurbo por kompletigi laboran viziton.

Dum sia restado en Sud-Afriko, la membro de la Politika Buroo de la Komunista Partio de Kubo kaj de la ?tata Konsilantaro okazigos plurajn renkonti?ojn kun registaraj gvidantoj kaj politikaj partioj en la lando.

Inter ili, la? la programo, li renkonti?os kun sia sudafrika ekvivalento, Nosiviwe Noluthando Mapisa–Nqakula.

Lazo Hernández estis akceptita ?e la  flughaveno de Johanesburgo Oliver R. Tambo fare de Lulama Rulumeni, direktoro de la direktejo de Meksiko, Mezameriko kaj Karibio de la Eksterlanda Ministerio.

Kun la prezidanto de la kuba parlamento voja?is Ángel Villa Hernández, ?enerala vicdirektoro de Duflankaj Aferoj de la kuba Ministerio pri Eksteraj Aferoj, kaj Jesús Rafael Mora González, direktoro de Internaciaj Rilatoj de la Nacia Asembleo, same kiel aliaj oficistoj.

La kuba delegacio alvenis el Namibio, kie ili ?eestis la ?tatan enterigon de la ?us forpasinta tria prezidanto de tiu nacio, Hague G. Geingob.

En Windhoek,   Lazo Hernández okazigis laborkunvenojn kun sia namibia ekvivalento, Peter Katjavivi, kaj kun Lukas Sinimbo Muha, prezidanto de la Nacia Konsilio de Namibio, gvidantoj, kiuj elstarigis la solidarecon de sia popolo kaj lando kun Kubo fronte al la unuflankaj regula?oj truditaj de Usono.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/348278-en-sudafriko-prezidanto-de-la-parlamento-de-kubo-esteban-lazo

Radio Habana Cuba